

BOHEMA ESPERANTISTO

ČESKÝ ESPERANTISTA

MĚSÍČNÍK PRO ŠÍŘENÍ ESPERANTA MEZI ČECHY.

ORGÁN „SVAZU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ“ V RAKOUSKU.

ZODPOVĚDNÝ REDAKTOR A VYDAVATEL:

DR. STAN KAMARYT.



ROČNÍK III.

(ŘÍJEN 1908—ŘÍJEN 1909).



PRAHA 1909.

NÁKLADEM FERD. BOHÁČKA NA MORAVĚ. — TISKEM «POLITIKV» V PRAZE.

IDEO DE J. A. COMENIUS PRI LA LINGVO UNIVERSALA.

Originale verkis Jos. Krumpholtz.*)

Kiel malmulte konas la fremdularo eĉ la plej grandajn virojn de la malgrandaj nacioj, tion atestas ekzemple la granda kaj konata franca verko de profesoroj Dro L. Couturat kaj Dro L. Leau: »*Histoire de la langue universelle*«¹⁾, kiu malgraŭ sia granda amplekso eĉ unu vorteton ne diras pri unu el la plej unuaj kaj plej grandaj propagandintoj de la ideo pri la artefarita lingvo universala — pri J. A. Comenius (Komenský).

Kaj tamen Comenius, la glora reforminto de lernejoj, pli ol 30 jarojn okupis sin per nia esperantisma ideo: per la helpo de la artefarita lingvo universala disvastigi la veran civilizon kaj tiamaniere plifaciligi, se ne ebligigi, la fratecon kaj pacon inter la nacioj. *

Do ni pagas sole nian ŝuldon al granda nia samideano kaj prapatro, se ni publikigas tiun ĉi artikoleon, kiu estas la ekstrakto de la pli granda artikolo pri la sama temo publikigota en la nova esperanta gazeto: »*Internacia Pedagogia Revuo*«.

* * *

Kiel oni scias, la renovigo kaj plibonigo de la instruado kaj edukado neniam estis por Comenius la lasta celo, sed ĉiam sole preparo kaj ŝtupo al io pli alta, pli nobla. En la komenco de ekzilo ĝi estis la »restitucio« de lia bohemo-moravia patrujo kaj eklezio, kaj kiam tiu ĉi espero malaperis, Comenius transiras al la ideo de la — »pansofio«. Sed eĉ tio ne sufiĉas al Comenius, kaj li donas sian panso-

*) Represo aŭ traduko de tiu ĉi artikolo estas permesata, se oni citas la nomon de la aŭtoro kaj la gazeton »*Ĉesky Esperantista*«. Laŭeble oni sendu al ni du ekzemplerojn. *Rim. de la redakcio.*

¹⁾ Paris, Librairie Hachette et Cie., 1903, pĝ. XXX+576.

fion en la servojn de reformo de la maljuniĝanta mondo, de reformo de la homaraj aferoj entute, de laboro, kiu havis grandegan signifon filozofian kaj politikan, kaj en kies sistemo trovis si n lokon interaliaj ankaŭ »panglottio«, t. e. universala formado kaj uzado de ia unu por la tuta mondo komuna lingvo.

Enprofundiĝinta en siajn grandiozajn planojn Comenius deziris, ke la civilizo estu ĝenerala, t. e., ke ĝi koncernu ĉiujn homojn sen diferenco de sekso kaj deveno, kaj ke ni kun la ekkonado de si mem kaj ĉirkaŭaĵo ekzercu ankaŭ la prudentecon kaj lertecon precipe en la lingvo gepatra kaj poste ankaŭ en alia, kiu — kiel skribis bohema komeniologo F. J. Zoubek — devus esti lingvo en la renovigita edeno kaj loĝejo de la homara bonfarto.

Kaj kiu lingvo estus kapabla ludi tiun rolon?

Sendante la 1^{an} de aprilo 1668 sciigon pri sia verko »Via lucis« al Reĝa scienca akademio en London, Comenius skribas interalie, ke li en tiu verko, skribita jam en la jaro 1641 — sekve en la tempo de la plej granda gloro de Comenius — kuraĝis serĉi la metodon, kiel plibonigi lingvojn apartajn kaj per la nova metodo unu universalan lingvon krei kaj konsili, ke la ellaboradon de la pansofio oni transdonu al multaj kaj diligentaj saĝaj viroj el ĉiuj nacioj, por ke ĝi estu korporacio internacia. Centro de tiu ĉi korporacio estu en London kaj en ĉiu nacio estu ankoraŭ pli malvasta korporacio de scienculoj, kiuj ĉiuj traktadu kaj korespondadu inter si per la nova lingvo universala, kiun oni por tiu ĉi celo devus, kompreneble, nur krei, ĉar la lingvo latina jam tiam ne sufiĉis por ŝanĝitaj kaj pligrandigitaj bezonoj.

Kaj al tiu ĉi nova, artefarita lingvo universala Comenius dediĉis ne sole kelkajn paragrafojn, sed ankaŭ tutajn ĉapitrojn de siaj plej bonaj kaj plej grandaj verkoj de la lastaj kaj sekve la plej karaj 30 jaroj de sia benita vivo.

Krom siaj leteroj al Mersennius, Hartlib ktp. Comenius skribis pri la artefarita lingvo universala unue en la jaroj 1640—1 en sia plej perfekta verko filozofia »Via lucis«, en la jaroj 1642—3 en la verko »Pansophiae diatyposis«, en la jaroj 1644—66 en sia plej granda kaj plej nobla verko »De rerum humanarum emendatione consultatio catholica«, en la jaroj 1645—6 en sia fama »Linguarum methodus novissima«, kie li sen kia ajn mistiko la ideon kaj utilecon de unu lingvo universala denove konfesas kaj sole pro manko de tia lingvo provizore lasas la taskon de universala lingvo al la lingvo latina. Sed

post la disigo de Bohem-moraviaj fratoj el Lissa li denove revenas en Amsterdam (1656—70) al artefarita universala lingvo kaj sendube sin per ĝi okupas, kiel ŝajnas atesti tion kelkaj lokoj en liaj plej lastaj verkoj: „*Unum necessarium*“ el la jaro 1668 kaj *Triertium catholicum*“ el la jaro 1670.

(Daŭrigo.)



SIGNIFO DE L. N. TOLSTOJ.

El la lasta ĉapitro pri Tolstoj en la verko »*O filosofii pŝtomnosti*« (Pri la filozofio de l'estanteco, 1904) de Dro *Frant. Krejčí*.

En tio estas signifo de l'instruo de Tolstoj, ke, forigante la diferencon inter la religio kaj filozofio, ĝi estas kapabla komenci reformon de malsupre, el la popolo, el la subaj sferoj. De tie penetros la ideo en la suprajn sferojn pli rapide kaj pli facile ol en la direkto returnita. Per la movo de la subaj sferoj ekmoviĝos la tuta sociala korpo antaŭen, ĉar ŝoviĝis la fundamento. La pli supraj sferoj kaj la mezo povos venke kontraŭstari nenian ajn movadon de sube, sed la movado de la pli supraj sferoj devas esti multe pli forta, multe pli rimarkebla, por ke la subaj sferoj estu tuŝitaj per ĝi. Car la sferojn malsuprajn regas la kredo religia, Tolstoj havas rektan aliron al ili; lia instruo ne elvokas la kontraŭstaron, ne forprenas ilian religion, donas al ili la novan kredon kaj siajn progresemaĵojn, kiuj al la pli supraj sferoj estas kompreneblaj sen la etiko religia kiel filozofio. Per sia instruo Tolstoj efikas sur la tutan socion samtempe kaj tio estas afero, kiun oni ne trovas ĉe la aliaj filozofiaj opinioj.

Per tio ricevas motivojn lia tuta agado populariga, tio estas agado celanta al la klerigo kaj morala levo de la popolo; ĉiuj broŝuroj kaj flugfolioj, kateĥismoj kaj interpretoj de l'evangelioj, interpretoj de l'ekleziaj komprenaĵoj, plibonigoj celantaj animigi kulton, alfabetlibroj, populare verkitaĵoj rakontoj moralinstruaj kaj la moralinstruaj predikoj pri la plej diversaj objektoj. Per tio ĉiuj specialaĵoj de la moralista agado de Tolstoj ricevas pli altan sanktigon, antaŭ ĉio la fakto, ke li subigis artistan instinkton al la servoj de la klerigo de la popolo kaj deturnis sin de la ĝisnuna kreado artistika, kun kio ne povas amikiĝi la mondo literaturista.

Ĉio, kion Tolstoj entreprenas en la fervora celado al sia idealo por levi la rusan popolon, de tiu ĉi vidpunkto meritas la saman estimon, kun kia ni akceptadis liajn verkojn

artistajn. En ĝi estas multe da aferoj ĉe la unua rigardo konsternantaj, multe da unuflankaj; sed ĝi estas la dia unuflankeco, obstineco de la grandaj viroj, sen kiu ili ne estus grandaj. La ora vojo de la mezeco estas rezervita ĝuste por la mezeco, normaleco. Mi ne neas ĝian signifon por la moraleco socia, sed kiel ni ĝin trovus sen unuflankeco de la grandaj viroj? Oni devas vidi ekstremeojn por trovi la vojon inter ili, kaj, por ke oni vidu ilin, iu devas ilin montri al ni. Por tiu celo la evolucio bezonas grandajn virojn. Por la kritiko sufiĉas ni malgranduloj.

Se oni karakterizas iun opinion de Tolstoj kiel unuflankan, oni ne vidu en tio la kondamnon de Tolstoj kaj el tio oni neniel povas juĝi pri la valoro de la principo, el kiu per la konsekvenca pensado tiu opinio naskiĝis. La opinio ne estas per tio refutita, sed karakterizita kiel ne *ekskluzive* valoranta, ke apud ĝi havas lokon ankaŭ la alia. Per aliaj vortoj, kio estas en ĝi unuflanka, estas vera, sed allasas plenigon. En tiu ĉi senco ŝajnas al mi unuflanka la opinio de Tolstoj pri la arto kaj scienco . . .

Sed ni lasu lin esti unuflanka. Ni ne konas la rusan popolon, pro kiu li estas unuflanka kaj ni ne konas rusajn cirkonstancojn, por ke ni donu al ni ĝustan kalkulon pri tio, ke sub la oficiala masko de l' ortodoksa religio kaŝas sin centmiloj da bonaj animoj havantaj firman volon, kiuj instinkte plenumas tion, al kio Tolstoj celas per sia instruoj kaj kio ŝajnas al ni tiom neebla aŭ almenaŭ ne ĝustatempa kaj antaŭtempa. Ni ne forgesu, ke Rusujo ankoraŭ ne travivis en kerno de sia popolo tiun purigan kaj bruan transiron, kiun la okcidenta Eŭropo travivis per la reformacioj kaj per la franca revolucio. Kio venis tra la supra sfero de l' inteligentularo en Rusujon el tiu eŭropa eksciteco, tiu moderna kulturo, aŭ estas nekapabla efiki ĝis sur la subajn sferojn, aŭ efikas sur ilin ne bonfare, sed detrue. Ĉiamaniere en la rusa popolo kunpuŝiĝas influoj heterogenaj, naskiĝas bolado, en kiu estas danĝero de eksplodo de la perfortemaj instiktoj.

(Fino.)



LA BUFO.

El »Krupėje samovaru« de *Aug. Eug. Mužih.*

Ĉiuj infanoj estas malbonaj kaj malicaj. La homo estas de la naturo kreaĵo brutala. Delikata sento kaj kompato

elkulturigās en ni nur dum kelka tempo. Observu sole, kiel la infano brilas per ĝojego, se ĝi povas sekrete fari malbonon al iu — al besto, kiu ne povas defendi sin!

Malbelega bufo — »malbelega« laŭ nia opinio, sed la naturo scias nek pri la malbelegaj nek pri la belegaj kreaĵoj — saltis tra herbo, kiel al mi — infano — ŝajnis, abomene, malgracie. Mi plenumis la heroan kaj meritplenan faron, kiel mi supozis, liberiginte de ĝi la mondon. Mi baŭis ĝin per ŝtonoj kaj mi havis sovaĝan ĝojon kiel armeestro, kiu venkis la malamikan armeon kaj ordonas ĝin senkapigi. La disbatita korpeto, kvazaŭ alnajlita per akra ŝtono ĝin trapikinta, restis senmove sur la vojo. Kaj sole la okuloj, tiuj grandaj elstarantaj okuloj, ŝajnis paroli al mi: »Kion mi faris al vi, per kio mi faris al vi malbonon?« Tiuj okuloj!

Mi enrigardis ilin por la momento kaj tuj ekregis min la sento, kvazaŭ mi estus mortiginta kreaĵon pensantan, sentantan, la homon. Mi forkuris hejmen. Mi evitadis la lokon, kie kuŝis la malviva rano, kaj longe, longe mi ne povis forgesi tiujn okulojn! El la lingvo bohema tradukis *Karel Maršák*.



JAK JSEM SE STAL ESPERANTISTOU.

Vypravuje *Dr. Enriko Fischer*.

— — V roce tisícím devítistém třetím, dav se na cestu do Orientu, byl jsem v jídelním vagoně, který vezl mne z Bukurešti do Kystendže až k moři. Tu zpozoroval jsem pána, který marně namáhal se, aby cosi vysvětlil sklepníkovi. Tento použil všech svých znalostí jazykových a mluvil rumunsky, srbsky, turecky, bulharsky a rusky. Marně! Cizinec nerozuměl. Přiblížil jsem se, hotov pomoci — mluvím kromě rumunského ještě sedmi jinými jazyky — a ptal jsem se německy, francouzsky, anglicky, italsky, potom maďarsky, španělsky a řecky, jak mohu mu pomoci. Vše matno! Neznámý nerozumí ani jednomu z těchto dvanácti jazyků! Tu vzpoměl jsem si na časopisecký

KIAMANIERE MI FARI- ĜIS ESPERANTISTO.

Rakontas *Dro Enriko Fischer*.

— — En la jaro mil naŭcent tria, mi, komencante la vojaĝon tra la Oriento, troviĝis en la manĝvagono, kiu veturigis min de Bukarest al Konstanca ĝis la maro. Jen mi rimarkis sinjoron, kiu vane klopodis klarigi ion al la kelnero. Tiu ĉi aplikis ĉiujn siajn lingvajn konojn kaj parolis rumane, serbe, turke, bulgare kaj ruse. Vane! La fremdulo ne kompremis. Mi, preta por helpo, alproksimiĝis — mi parolas krom la rumana ankoraŭ sep aliajn lingvojn — kaj mi demandis germane, france, angle, itale, poste magiare, hispane kaj greke, kiamaniere mi povas helpi al li. Ĉio vana! La nekonato ne komprenas eĉ unu el tiuj dek-du lingvoj! Tiam mi rememoris pri ĵurnala artikolo

článek o esperantě, který jsem před nedávnem pochybuje četl a ptal jsem se: »Ĉu vi parolas esperante?« (Mluvíte-li esperantsky?) Vykřik radosti! »Jes, mi parolas!! (Ano, mluvím.) A pokračoval v jazyce, kterému nyní já nerozuměl; neboť touto větou má znalost esperanta byla vyčerpána. Sotva cizinec to zpozoruje, ihned ví si rady. Vtiskl mi do ruky malou knížku v anglickém jazyce, jednu z tak zvaných klíčů esperanta existujících téměř ve všech jazycích, knížek, které ačkoli váží pouze pět gramů, přece obsahují celou mluvnici a slovník; a nyní počalo učení. Když po desíti hodinách opět jsme se viděli na palubě parniku, mohl jsem již dostatečně dorozuměti se esperantem a zvěděl jsem, že můj nový spolucestující, Švéd, také ovládá čtyři jazyky, totiž kromě švédského, norského, dánského a finského. Cizinec, sklepník a já mohli jsme mluvití dohromady šestnácti jazyky a přece nemohli jsme se dorozuměti. Od toho dne jsem nadšeným esperantistou. — —

Z esperanta přeložil Fr. Vedral.

pri esperanto, kiun mi legis, dubante, antaŭ nelonge kaj mi demandis: »Ĉu vi parolas esperante?« Krio de ĝojo! »Jes, mi parolas!« Kaj li daŭrigis en la lingvo, kiun nun mi ne komprenis; ĉar per tiu ĉi unu frazo mia kono pri esperanto estis limigita. Apenaŭ la fremdulo tion rimarkas, li tuj scias la rimedon. Li enmetis en mian manon malgrandan libreton en la angla lingvo, unu el la tiel nomataj esperanto-ŝlosiloj ekzistantaj en preskaŭ ĉiuj lingvoj, libretoj, kiuj, kvankam pezante sole kvin gramojn, tamen enhavas la tutan gramatikon kaj la vortaron; kaj nun la lernado komencis. Kiam post dek horoj ni revidis nin sur la ferdeko de la vaporŝipo, mi povis jam sufiĉe komprenigi min per esperanto kaj mi sciigis, ke mia nova kunvojaĝanto, Svedo, ankaŭ posedas kvar lingvojn, nome krom la sveda, la norvegan, danan kaj finnan. La fremdulo, la kelnero kaj mi, ni kune povis paroli dek-ses lingvojn kaj tamen ni ne povis interkompreniĝi! De tiu tago mi estas entuziasmigita esperantisto. — —



LA REZULTATO DE MIA PACIGA ENTREPRENO.

Raportas kaj al ĉiuj bohemiaj esperantistoj prezentas

Dr. A. Batěk.

Antaŭ tempo mi dissendis malfermitan leteron al la bohemiaj esperantistoj, kies mallonga enhavo estis: S-ro Kühnl, redaktoro de »Casopis českých esperantistů« iniciatis la fondon de »Bohema Unio Esperantista« (mallonge: Unio), kiu celis unuigi ĉiujn bohemiajn societojn esperantistajn. Multaj membroj, kies parolanto fariĝis s-ro Bouška, deziris, ke en la Unio estu reprezentataj ne sole la societoj, sed ankaŭ la individuoj, kiuj estas en neniu societo Sed, kiam ilia opinio estis de s-ro Kühnl subpremita, tiuj membroj, kiuj el la klubo kaj per tio ankaŭ el la Unio estis parte eksigintaj parte eksigitaj, fondis la novan unuigon nomitan »Bohema Asocio Esperantista« (mallonge: Asocio). Mi vidis, ke en la Unio estas grupigita la plimulto da niaj societoj kaj la redakcio de la gazeto, kontraŭe en la Asocio estas niaj plej bonaj laborantoj por esperanto, kiel Krumpfole, el la klubo eksigitaj Čejka, Bouška, Kamaryt, Riegel kaj aliaj, tial mi petis pri la kunigo de ambaŭ unuigoj per la vortoj: »Se Vi, sinjoroj, ŝatas la

prosperadon de nia komuna ideo almenaŭ iom pli multe ol la personan profiton, forgesu, mi petas, la ofendojn al Vi faritajn, donu al Vi la manojn, kaj unuigu la Union kaj Asocion. — — Se Vi ne volas doni al Vi la manojn senpere, donu ilin al mi, kaj mi zorgos, ke ilia kunpremo ne estu malamika.»

Tuj poste s-ro *Ĉejka* sendis al mi la kondiĉojn, sur kies bazo la Asocio estus inklina al la repacigo povanta kunigi ambau unuigojn. La Unio atendis ĝis la ĝenerala kunveno la 29-an de la marto 1908. En tiu ĉi ĝenerala kunveno estis decidite sendi al mi la leteron, ke la ĝenerala kunveno de la »Bohema Unio Esperantista« konatigis kun la enhavo de mia letero, konstatis la malbonajn kaj unuflankajn informojn, kaj komisiis du delegitojn, sinjorojn *Pohl* kaj *Ĉibor*, rajtigitajn fari jenan deklaron (laŭ la protokolo):

1. Ĉiujn aferojn koncerne la Union priskribitajn en la letero proklami kiel malverajojn, kaj per la dokumentoj pruvi la veran staton de la afero;
2. postuli en la nomo de la ĝenerala kunveno, ke s-ro *Dro Batěk* laŭeble forigu la flugfoliojn, kaj, ĉar la flugfolioj estis jam dissenditaj, ke li skribu korekton, konvinkiginte pri la vera stato de l' afero per la prezentitaj dokumentoj, ke la eldonita flugfolio ne estis apogita sur la vero*);
3. se tiu ĉi korekto estus rifuzita, ke estus necese sciigi pri tiu ĉi agado la publikon, kaj postuli la korekton laŭ § 19 en la okazo, ke la flugfolio estus represita en la gazeto »Zájmy všelidské«.

Konsente kun tiu ĉi ĝenerala kunveno mi ricevis jenan skribaĵon:

»Mi permesas al mi, sciigi al Vi, ke la ĝenerala kunveno de la asocio**» Bohema Unio Esperantista« unuanime decidis rememorigi Vin, ke la enhavo de la Malfermita letero al la bohemiaj esperantistoj disvastigata de Vi, ne estas apogita sur la vero koncerne la Union, kaj ke la kunestintaj reprezentantoj de la bohemiaj societoj esperantistaj bedaŭras, ke Vi ne petis de la kompetentaj faktoroj ĝustatempe la oficialajn informojn pri nia asocio, kaj ili klarigas al sí la malverajojn enhavitajn en Via letero tiel, ke Vi estis unuflanke kaj erare informita. Por »Bohema Unio Esperantista« Gustav Ĉibor, t. t. sekretario«.

Unuavide estas videble, ke la nomitaj sinjoroj ne plenumis la taskon donitan de la ĝenerala kunveno al ili; el ĝi ili faris sole la duonon de la unua punkto: ili ĉion proklamis malveran. S-ro *Pohl* eĉ ne subskribis sin, kaj s-ro *Ĉibor* ne postulis de mi la korekton konvinkiginte min per la prezentitaj dokumentoj.

Mi respondis per ĉi-tiu skribaĵo:

»Al estimata komitato de la »Bohema Unio Esperantista« en Praha! Ĉar mi intencas eldoni la duan malfermitan leteron al la bohemiaj esperantistoj, kaj ĉar laŭ Via opinio el la 3 de aprilo t. j. la unua letero ne estis laŭvera koncerne la Union, kaj, ĉar Vi esprimis la bedaŭron, ke mi ne petis ĝustatempe la oficialajn informojn, mi petas pri tiaj informoj kaj precipe pri la klarigo, pri kio mi eraris en mia letero, kiun mi aldonas,

*) La legantoj ne riproĉu la esperantan tradukon pri la stranga stilo ĉu ĉi tie ĉu aliloke, kie estas tradukitaj citaĵoj, kies stilo devis resti neŝanĝita, eĉ kiam ili estas konfuzaj stilaj kriplaĵoj. *Rim. de la redakcio.*

**) Tiun-ĉi vorton »asocio« antaŭ sia titolo la Unio konsekvence uzas por erarigi kaj trompi la neinformitojn kaj kaŭzi konfuzon ĉe la publiko pri la diferenco inter Unio kaj Asocio. Kredeble la sola nomo de la Unio mem nesufiĉas por altiri la intereson. *La redakcio.*

por ke mi povu en mia dua letero ĉi tiujn cirkonstancojn laŭ vera stato klarigi. La poŝtmarkon por la respondo mi aldonas.»

Post tiu ĉi demando mi ricevis novan certigon, ke la ĝenerala kunveno detale pritraktis ĉiujn punktojn de mia letero, sed, ke ĝi ne trovis en ĉiuj miaj sciigoj koncernantaj la Union eĉ unu veran, respondantan al la realeco. Por ricevi la dokumentoj mi estis invitita en la kancelarion en Karlin kun la kondiĉo, ke mi antaŭanconco mian viziton.

Kompreneble por mi, kiun miaj ofico kaj loĝejo ligas al Plzeň, ne estis facile viziti la sinjorojn en Karlin,^{*)} tial mi ilin petis sendi al mi la dokumentojn, kiujn mi poŝtrevenante resendos kaj ĉiujn elspezojn kaŭzitaĵn mi pagos.

Tiu ĉi peto restis sen la respondo kaj la traktado kun la Unio restis senrezulta.

Sed mi ricevis de la klubo en Praha, kies membro mi ankaŭ estas, la leteron de tiu ĉi enhavo:

»Estimata sinjoro! En la kunveno de nia klubo estis tralegita Via malfermita letero al la bohemiaj esperantistoj, kies enhavo konvinkigis nin, ke la klarigoj prezentataj de Vi tute ne apogas sin je la vero. Ni povas klarigi al ni la aferon sole per tio, ke Vi ne celis tiel la esencon de la materialo, kiel la materialon entute^{**}): alimaniere Vi estus informinta Vin antaŭ ĉio en la societo, kies membro Vi estas kaj kies agadon Vi proklamas kiel erarojn, bataladon kaj perfortadon. Ni bedaŭras, ke Vi donas Vian nomon al la sciigoj, kies rezultato, se ne celo, estas fari konfuzon kaj disiĝon en vicjoj de bohemiaj esperantistoj, kiuj estas alarmataj de kelko da individuoj nematuraj por la vivo societa. Kun estimo en la nomo de Esperantista klubo en Praha Jan Hradil, t. t. viceprezidanto, Otakar Davídek, t. t. sekretario.«

La enhavo de tiu ĉi letero, kiu rigardante la leterojn antaŭajn estas redaktita en stilo ofenda kaj aroganta, estas komprenebla tiam, kiam mi malkaŝas, ke mi dume ricevis ankaŭ la leteron de s-ro *Žůhnl*, kiu riproĉas al miaj sciigoj la malveron kaj neinformitecon kaj al kiu mi respondis tiamaniere, ke li devis ekkoni, ke mi estas informita kaj pli bone informita ol li mem. Ankaŭ li respondis al mi per la kolerplena karto, en kiu li riproĉas al mi la malamon al li kaj al la klubo de Praha.

La traktado kun la Unio finiĝis do sensukcese, ĉar de la oficialaj organoj mi povis neniel ricevi ion alian ol la riproĉon, ke mi ne ĉerpis la informojn oficialajn kaj kiam mi petis pri ili, mi ricevis sole malafablaĵojn kaj riproĉojn; sed kontraŭ tio mi ricevis pli ol 25 leterojn de diversaj esperantistoj el ambaŭ partioj, kiuj ĝenerale ĉiuj estis skribitaj objekte, multfoje eĉ tre sincere, tiel, ke mi povis fari al mi precizan konkludon. Al tiuj ĉi sinjoroj, inter kiuj estas nomoj de la plej eminentaj laborantoj por esperanto kaj de la personoj, kiuj okupas honorajn funkciojn en la Unio kaj Asocio, mi ĉi tie esprimas mian koran dankon pro la sciigoj donitaj al mi. Mi intencis komence publikigi ĉi tiujn sciigojn laŭvorte sen iu rimarko, sed mi baldaŭ forlasis tiun ĉi intencion, ĉar multfoje ili malkovras tre malbonajn personajn cirkonstancojn.

Sufiĉas, se mi sur tiu ĉi loko diros, kia estis la rezultato de la tralego de tiuj leteroj. Kaj tiun ĉi mi povas mallonge formuli. Mi konvinkigis, ke la Unio estis prava, ke mia malfermita letero efektive estis bazita sur la vico da eraroj, ĉar efektive mi estis malbone informita. Kaj korekti la malve-

*) malproksima 115 kilometrojn!

***) La leganto rememoru la rimarkon pri la stilo de kelkaj citaĵoj!

raĵojn tie enhavitajn kaj priskribi ilin laŭvere, estas celo de tiu ĉi raporto. Mi faras tion sen tribunala devigo, sen iu ajn morala premo sole pro la motivo, ke mi konvinkigis pri la eraro kaj ke mi volas la tiame prezentitajn dirojn priskribi laŭ vera stato.

1. Mi diris, ke s-ro *Kühnl* eldonis la gazeton, ĉar s-ro *Čejka* ne daŭrigis ĝian eldonadon. Sed la afero estis tia: *Čejka* post la ĉesigo de la gazeto diligente okupis sin per eldonado de la lernolibroj kaj li difinis por la klubo en Praha tiel favorajn kondiĉojn vendadajn, ke ankoraŭ la 1-an de decembro 1905 li ricevis de la klubo la leteron, en kiu laŭvorte estas skribite: »Ĉar ni estas firme konvinkitaj, ke Vi alportas por la disvastigo de nia komuna ideo proprajn oferojn, tiom pli multe surprizas nin Via malavara donaco por la bono de nia kaso. Sed samtempe la klubo ricevis de nobla favoranto de nia ideo monan donacon. La komitato diskutinte pri tio unuanime decidis proponi al Vi kiel honoran donacon, montron de reciprokaj simpatioj kaj komprenon de Via valora oferemo, la sumon de 50 K kaj samtempe kontante pagi al Vi ĉiujn ŝuldatajn sumojn el la antaŭa tempo (krom broŝuroj).« Subskribitaj: s-roj Kraus kaj Ed. *Kühnl*. *Čejka* donacis tiujn ĉi 50 K kiel honoran honorarion al sia kunlaboranto s-ro *Krumpholtz* kaj samtempe li anoncis, ke li komencos reeldonadi la gazeton »Český Esperantista-Bohema Esperantisto.« Poste okazis en Praha la kunveno, en kiu oni decidis reeldonadi la gazeton kaj mone subteni ĝin per subskripcio de 160 sumoj po 5 K, sed da tiaj sumoj estis subskripciiitaj 80. Post tiu ĉi kunveno en la klubo de Praha oni traktis pri tio, kiel la klubo akirus kiel eble la plej grandan influon je la gazeto. Tio estis farata tiamaniere, ke la tuta entrepreno estis pereigita kaj al la subskripciiintoj estis redonita la mono. Poste en la klubo oni traktis pri la fondo de propra gazeto kaj s-ro *Kühnl*, kiu jam antaŭe traktis kun *Čejka* pri la redaktado de »Český Esperantista,« estis komisiita per ĉefredaktado. Al s-ro *Kühnl* oni aldonis redakcian komitaton, sed de ĝi li sentis sin tiel limigata, ke li proklamis, ke li eldonados mem la gazeton, eĉ apude la gazetojn de *Čejka* kaj de la klubo. La redakcia kaj klubo komitatoj akceptinte tiun ĉi deklaron, transdonis la eldonadon de la gazeto al s-ro *Kühnl*, aŭ propre, kiel tio estis laŭ la deziro de s-ro *Kühnl* formulita, ĝi »forlasis la eldonadon de la gazeto, kiam estimata s-ro *Kühnl* decidis eldonadi mem la gazeton similan.« Per tio en la klubo naskiĝis la disiĝo, dum kiu s-ro *Kraus* kaj liaj amikoj ekŝiĝis el la klubo kaj la klubon kaj gazeton regis fratoj *Kühnl*.

(Daŭrigo.)



RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

Fonda ĝenerala kunveno de „B. A. E.“ (Bohema ASOCIO esperantista) okazis la 27 de septembro 1908 en Praha. La kunvenon malfermis prezidanto de la prepara komitato Dro *Kamaryt*, kiu bonvenigis la kunvenintojn, precipe delegitojn, kaj tralegis ricevitaĵajn salutojn. Post la elekto de la estraro de la kunveno (financa konsilanto *Ulehla*, prezidanto, f-ino *Fiedlerová*, viceprez., inĝ. *Závorka*, protokolisto) estis aprobita la raporto de la prepara komitato, kiu konstituiĝis la 29. XII. 1907 en la kunveno kunvokita de H. K. *Bouška*, ellaboris kaj al ministrara aprobo prezentis la statutojn, eldonis agitadajn flugfoliojn kaj aranĝis publikan paroladon pri la Dresdena kongreso. La statutoj estis aprobitaj. Estis nomitaj honoraj membroj: Dro *Zamenhof*, *Čejka* kaj *Krumpholtz*. Kiel oficiala organo de

»B. A. E.« estis akceptita la unua bohem-esperanta revuo »Ĉeský esperantista« (Bohema esperantisto). Estis balotitaj administracia, kontrola kaj lingva komitatoj. La kunveno estis finita per la postparoloj de s-roj Bouška kaj Ŭlehla. Al la honoraj membroj estis senditaj salutaj telegramoj. — Elek-tita estraro: profesoro doktoro Batěk el Plzeň, prezid., lernejestro Kožíšek el Zápý kaj magistrata adjunkto Kraus el Praha, viceprezidantoj, demon-stratoro de bohema universitato Dro Kamaryt, ĝenerala sekretario, instru-isto Grňa el Jevičko kaj f-ino Vaníčková el Praha, sekretarioj, ĉeflikvidatoro Biskup el Praha, kasisto, ĉefa librotenisto Iglauer el Praha, bibliotekestro. Membroj de administracia komitato: lernejestro Alferi el Zdisla-vice, komercisto Ficek el Brno, imposteja kontrolisto Kutilek el Plzeň, advoka-ta kandidato JUC. Harvíř el Praha, profesoro Fierlinger el Olomouc, instruisto Khun el Jičín, s-ino Krausová el Praha. Anstataŭuloj: inĝe-niero Hořeňovský el Pardubice, juristo Riegel, f-inoj Sobotová kaj Vaníč-ková el Praha. Kontrola komitato: financa komisario Dro Palek kaj financa konsilanto Ŭlehla el Praha. Lingva komitato: s-roj Ĉejka (prezidanto), Krumpholtz (viceprezidanto), Bouška (sekretario), Dro Batěk, Biskup, prof. Fierlinger, prof. Fridrich, Grňa, Holub, Dro Kamaryt, Khun, prof. Kolkop, s-ino Krausová. — Per tio fondiĝis en Bohemujo unuiĝo, kiu volas honeste kaj serioze labori por nia lingvo kaj ideo inter Bo-hemioj en Aŭstrio, kiu volas realigi multajn kaj bonajn planojn por bono de nia afero kaj kiu por tiu celo deziras unuigi ĉiujn bohemajn esperan-tistojn kaj esperantistajn societojn, kiuj volas sincere kaj vere labori por la afero mem, kiuj celas sole la prosperadon de esperanto kaj esperan-tismo, kiuj estas trapenetritaj per la spirito kaj ideo de esperantismo. »B. A. E.« volas esti centra unuiĝo, kiu ne limigadas la iniciaton de lokaj societoj, kluboj kaj grupoj, kiu ne enmiksadas sin en la sferojn de ilia agado, kiuj sole helpadas kaj subtenadas societojn lasante al ili plenan aŭtonomion kaj iniciaton, kiu efektivigadas sole la entreprenojn, por kiuj lokaj societoj ne sufiĉas au ne estas kompetentaj, kiu ne ordonadas kaj permesadas, sed sole konsilas kaj helpas al la societoj. »B. A. E.« volas peni, ke la nombro de bohemaj esperantistoj ekster organizo estu kiel eble malplej granda, tial ĝi ebligas la partoprenon en centra organizo ankaŭ al izolitaj personoj en lokoj, kie ne ekzistas loka societo kaj al personoj, kiuj pro diversaj motivoj ne povas aŭ ne volas aliĝi al loka societo kaj tamen ofereme kaj efike laboras por nia afero. »B. A. E.« volas esti unuiĝo, en kiu nia movado ne estus malbonuzata por servi al personaj intereso, gloramo kaj profitemo, en kiu nia afero ne estus ridindigata kaj senkredi-gata per faroj nesaĝaj aŭ nehonestaj, en kiu la laboro de individuo ne estus glorigata kaj fanfaronata, sed ankaŭ ne malhonorigata per suspektado kaj kalumniado, en kiu estus respektata persona opinio kaj libereco, en kiu neniu estus perfortata kaj persekutata, en kiu ĉiu faro devenus el konvinko kaj amo al la afero. »B. A. E.« volas esti unuiĝo liberigita de ĉiu ordone-mo, perfortemo, trompado, malsincereco, suspektado, malhonorigado, demagogio... »B. A. E.« havas multajn kaj bonajn planojn, multan kaj bonan volon, multajn kaj bonajn laboratojn, sekve ĝi laborante sisteme kaj persiste trafos certe sian celon: disvastigi niajn lingvon kaj ideon inter publiko kaj purigi niajn proprajn vicojn. »Ni laboru kaj esperu!«

Bouška.

Grava rimarko: Ĉiuj sendaĵoj por »Bohema asocio esperantista« estu adresitaj ekskluzive al la ĝenerala sekretario: Dro Stan Kamaryt, demonstratoro de bohema universitato en Praha-VI. Albertov, Bohemujo-Aŭstrio.

Unua libro de tradukoj el la bohema literaturo. Antaŭ mallonga tempo aperis fine libro atendita, kiu samtempe vastigus la konojn pri la bohema literaturo en la mondo eksterlanda kaj propagandus nian esperantan ideon inter niaj samlandanoj. La libro — espreble — helpas finigi la malbonajn opiniojn pri ni, Bohemoj, ĉe la fremduloj, kiam ili vidos, ke ni havas bonajn aŭtorojn kaj verkojn atingantajn la nivelon ĝeneralan, kaj niaj samlandanoj, kiuj volas ellerni la lingvon internacian per la metodo de la konstanta legado de la konataj tekstoj sen la gramatiko, havas la plej bonan okazon en tiu ĉi traduko, ĉar la teksto bohema estas konata al ili kaj ili sole devas observi per sia atenteco la esprimojn esperantajn de la bohema senco. La libro estas nomata „*Rakontoj*“ kaj enhavas kvar tradukojn de la verkoj de *J. Arbes*, t. e.: *El la vivo de Mozart*, *La blanka edziniga vesto*, *La unua nokto de la mortinto* kaj *Moderna Magdalena*. Ĉiu, kiu konas la meritojn de nia amata Arbes ne dubos, ke la tradukinto bone, tre oportuna elektis sian aŭtoron tradukotan. En la antologio oni trovas multe da belegaj priskriboj de la naturo kaj oni ne povos resti netuŝitaj per la forta sento de l'kompato. La traduko estas verkita tre zorge, oni trovas ĉi tie multe da belaj kaj lertaj esprimoj. Oni povas vere bonvenigi tiun ĉi libron kaj deziri, ke la tendenco de la tradukinto trovi sufiĉe da amikoj kaj sekvantoj.

Prof. Edm. Kolkop.

„**Internacia pedagogia revuo**“ komencos eliradi en oktobro 1908 kaj estos oficiala organo de „Internacia asocio de instruistoj“ (I. A. I.), kies membroj ricevas ĝin senpage (jaran kotizaĵon 1 Sm. akceptas kasisto Th. Ĉejka). La unua numero enhavas krom specialistaj artikoloj kaj raportoj pri la instruistaj kunvenoj en Dresden ankaŭ la regularon de I. A. I. La revuo estos redaktata sole en esperanto de konstanta kunlaborantaro konsistanta el diversnaciaj instruistoj kaj pedagogoj. Abonpago 1'50 Sm. (por nemembroj de I. A. I.), Redakcio kaj administracio ĉe Th. Ĉejka, Bystřice-Hostýn, Moravio, Aŭstrio.

I. Kramphoř.

La kongreso de slavaj instruistoj en Praha (9.—14. VIII. 08) akceptis la proponon de lernejestro H. Alferi, ke la kongresaj rezolucioj estu tradukitaj en ĉefajn lingvojn eŭropajn kaj en esperanton kaj senditaj al internaciaj kaj ĉefaj naciaj societoj pedagogiaj kaj instruistaj. *Bouška.*

Esperanto en la jubilea ekspozicio komerca kaj industria en Praha. Esperantistoj vizitantaj la grandan kaj gravan ekspozicion en Praha estas agrable surprizataj per tio, ke ankaŭ esperanto estas inde prezentata en ĝi. En la fako grafika (pavilono XX.) oni vidas antaŭ ĉio la ekspozicieton de esperantaj gazetoj, libroj, broŝuroj, reklamiloj, lerniloj, kartoj k. t. p. aranĝita de s-roj Barviř kaj Bouška en la loko luita de „Bohema societo esperantista“ por tiu celo. En la sama pavilono en la ekspozicieto de la granda presejo de „Politika“ estas ekspoziciita la monro de esperantaj tekstoj kaj kompostaĵo (paĝo el „Slovakoj kaj Magiaroj“ de H. K. Bouška). En la fako de komercaj korporacioj (pavilono III.) „Ĉeskoslovanská obchodnická beseda“ (Bohem-slava komerca societo) sur granda tabelo montranta la staton de la kursoj faritaj de ĝi, sciigas per la verda flageto, ke ĝi aranĝas ankaŭ kursojn esperantajn. La ekspozicia komitato mem respektis esperanton eldoninte kaj en la tutan mondon dissidentinte esperantajn flugfoliojn pri Praha kaj la ekspozicio.

Hkb.

Diverslandaj esperantistoj en Praha. En aŭgusto la esperantistoj en Praha havis plezuron bonvenigi ĉe si kelkajn centojn da esperantistoj francaj, anglaj, skotaj, germanaj, hispanaj, svisaj, holandaj, belgaj,

danaj, nervegaj, rusaj, polaj, bulgaraj kaj rumanaj, kiuj vizitis la ĉefurbon boheman kaj ĝian ekspozicion veturante aŭ al aŭ de la kongreso Dresden'a. Inter unuaj estis la karavano de U. E. A. (62 personoj gvidataj de s-o Schmidt) akceptita kaj gvidata en Praha de la delegito Kraus kaj de membroj de »Bohema societo esperantista«, »Virina grupo esperantista« kaj »Bohema asocio esperantista« kaj oficiale akceptita en la jubilea ekspozicio. Tiu ĉi karavano alveturis per la rapidvagonaro (kiu kun speciala permeso de la mistraro por fervojoj haltis en la stacio, kie la rapidvagonaro neniam haltas), alia karavano gvidata de s-o H. de Coppet alveturis biciklede. Post la kongreso alveturis ankaŭ karavano de s-o Mudie (proksimume 80 personoj) akompanata de »Bohema unio esperantista«. Malpli grandaj grupoj alveturadis ĉiutage dum la semajnoj aŭtaŭ kaj postkongresa, estante ĝoje bonvenigataj de lokaj esperantistoj. Tiuj ĉi vizitoj elvokis grandan kaj simpatian atenton de la bohemiaj publiko kaj gazetaro kaj havis efikan influon je la propagando. Preskaŭ ĉiuj ĵurnaloj raportis pri ili kaj kelkaj ilustritaj gazetoj (Zlatá Praha, Český svět, Světozor, III. Kurýr) publikigis la fotografajojn de fremdaj gastoj. *Bšk.*

